

3

„Akvon! Akvon!“

Inter Texas, New Mexico kaj la indiana teritorio, aŭ, esprimate alimaniere, inter la finaĵoj de la montaro Ozarks kaj la Sierra Guadalupe, ĉirkaŭate de la altaĵoj, kiuj limigas la supran fluon de la Rio Pecos, de la Canadian kaj la fontojn de la Red River, de la Brazo kaj de la Colorado, estas vasta, terura ebenaĵo, kiu povus esti nomata la ‚Saharo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj.‘

Dezertaj areoj plene je sekega, brulvarmega sablo interŝanĝas kun nudaj, flammarmaj rokejoj, kiuj ne kapablas doni eĉ ne la plej malriĉajn ekzistencokondiĉojn, ankaŭ ne al la plej malabunda plantokreskado. Subite kaj sentransire sekvas la malvarmega nokto post la varmego de la tago. Neniu sola *ĝebel*, neniu verda *wadi* kiel en la Saharo interrompas la mortan, monotonan dezerton. Neniu trankvila *bir* ellogas oazon per sia freŝiga humideco el la tero. Eĉ la stepo kiel transiro de la abundarbara montarejoj al la senviva dezerto plene mankas, kaj la morto ĉie prezentiĝas nude en ĝia plej teruriga speco al la okulo. Nur ie kaj tie — oni ne scias, per kiu kaŭzo kreita kaj tenata — staras soleca, ledeca prozopa arbedeto, fakte pro moko al la okulo, kiu sopiras al verda punkto. Aŭ oni trovas intertempe sovaĝan kaktospecon, kiu staras aŭ unuope aŭ en grupoj, aŭ dense kovras eĉ vastajn lokojn, senke oni povas kompreni ilian tieeston. Sed nek la prozopo nek la kaktos ofertas ĝojigan, bonfaran aspekton. Ilia koloro estas grizbruno, kaj ilia figuro malbelas. Ili estas kovritaj de dika sablopolvo, kaj ve al la ĉevalo, kiun la rajdanto kondukas en tian kaktospezon! Ĝi estas lezata de la harfinaj, ŝtalmalmolaj dornoj tiel je la piedoj, ke ĝi neniam povos iri plu. La rajdanto rezignu pri ĝi, kaj ĝi certe pereos pene, se li ne mortigas ĝin.

Malgraŭ ĉiuj teruraĵoj, kiujn la dezerto ofertas, la homo tamen kuraĝis iri en ĝi. Transpasas stratoj, supren al Santa Fé kaj Fort Union, transe al Paso del Norte, kaj malsupren al la bonakvumitaj prerioj kaj arbaroj de Teksaso. Sed per la vorto ‚strato‘ oni ne pensu pri la vojkonstruado, kiu havas tiun nomon en la civilizitaj landoj. Boneble rajdas sola ĉasisto aŭ vojtrovinto, societo de kuraĝaj riskemuloj aŭ suspektinda

indiana trupo haste trans la dezerto. Boneble kraketadas malrapida bovĉarado tra la senkonsola monotonejo, sed tie ne estas vojo, eĉ ne tiaj duonhore distancaj vojetoj, kiujn oni trovas en la Lüneburger Heide aŭ en la sablo de Brandenburg. Ĉiu rajdas aŭ veturas laŭ sia propra vojo, tiel longe kiel li rimarkas per signoj de la tero, ke li ankoraŭ iĝas en la deziritan direkton. Sed tiuj signoj ĉesiĝas eĉ por la plej sperta okulo, kaj ekde tie oni faris la progardaĵon indikigi tiun direkton per palisoj, kiuj estas starigitaj en la teron en kelka distanco.

Kaj tamen la dezerto postulas ilian oferojn, kiuj estas, rilate al la grandeco de tiu monotonejo, ege pli multenombraj kaj terurigaj ol tiuj de la afrika Saharo kaj la centrazia Gowi. Mortaj homoj, bestokadavroj, selpecoj, restaĵoj de ĉaroj kaj aliaj sinistraj lastaĵoj estas ĉe kaj sur la vojo, kaj malkaŝas rakontaĵojn, kiujn la orelo ja ne povas aŭdi, sed la okulo des pli klare rimarki. Kaj super tie, alte en la aero, ŝvebas la kadavrogrifoj, kiuj sekvas ĉiun plej etan moviĝon malsupre sur la sablo per timiga persistemo, kvazaŭ ili scius, ke la baldaŭa akiro certas al ili.

Kaj kiu estas la nomo de tiu dezerto? La loĝantoj de la ĉirkaŭaj regionoj nomas ĝin diference, foje angle, foje france aŭ hispane. Sed aliregione ĝi estas konata, pro la enterigitaj palisoj kiuj montru la vojon, kiel Llano Estacado. —

En la direkto al la fontoj de la Red River en la Sierra Blanca rajdis du viroj, kies ĉevaloj ŝajnis terurige lacigite. La bedaŭrindaj bestoj estis maldikiĝintaj preskaŭ ĝis la ostaro, aspektis taŭzite kiel birdo, kiu jam je la neksta mateno estus kuŝonta morte en la kaĝo, kaj peze movigis iliajn senfortajn membrojn, faletante je ĉiu paŝo, tiel malrapide, kvazaŭ ili estus kolapsontaj ĉiun momenton. Iliaj okuloj senbrilis, la langoj elpendiĝis inter la lozaj lipoj, kaj malgraŭ la ekbruliga tagvarmego tute neniu guto da ŝvito je iliaj korpoj kaj neniu ereto da ŝaŭmo je iliaj dentaroj estis rimarkebla, signo, ke, krom la de la dezerta ardo densigita sango, eĉ ne plu estis spuro da humideco trovebla en iliaj korpoj. La du ĉevaloj estis la Tony kaj mia mustango, kaj konklude la du rajdantoj apenaŭ ne povis esti aliaj, sed la malgranda Mark kaj mi.

Ni jam estis rajdintaj kvin tagojn trans la Llano Estacado, kie ni ankoraŭ komence trovis tie aŭ aliloke kelkan akvon. Sed nun ĉie ĉirkaŭ ni, estis tute neniu signo de tio, kaj mi ne povis eviti la penson, kiel utile estus la transportado de kameloj en tiun ĉi dezerton. La vortoj de Uhland iĝis en mian menson:

*„Preskaŭ, pro eviti kunan falon
la rajdanto devis porti la ĉevalon“*

Sed la plenumigo de la lasta verso, eĉ se ĝi estus estinta eble, oni ne povis pensi, ĉar la rajdanto estis en la sama senespera stato kiel iliaj bestoj.

La malgranda, kunsekiĝinta Mark pendis sur la kolo de sia ĉevalino, kvazaŭ li estus fikstenata nur per feliĉa cirkonstanco sur la ĉevalo. Lia buŝo estis malfermita, kaj liaj okuloj videbligis tiun fiksrigardantan, senaniman vidon, kiu rimarkebligas la proksimecon de la kompleta malakriĝinteco. Al mi mem ĉio estis, kvazaŭ miaj membroj estus pezigitaj per plumbaĵoj. La gorgo estis tiel seke, kvazaŭ ĉiu sonigo diskrevus aŭ disŝirus mian kolon, kaj tra miaj vejnoj fluis nur likvida erco. Mi sentis, ke daŭrus apenaŭ horon, ĝis ni sinkos de la ĉevalo kaj soifante restos ajn kie ni estis.

„Ak—von!“ Mark ĝemis.

Mi levis la kapon. Kion mi respondu? Tial mi pli bone silentis. Tiam mia ĉevalo faletis kaj haltis. Mi peniĝis laŭeble, sed ĝi ne estis pluirebla. La olda Tony tuj agis laŭ tiu ekzemplo.

„Deĉevaliĝu!“ mi diris, kaj ĉiu sono doloris al miaj voĉiloj. Estis, kvazaŭ la vojo de la pulmo ĝis la lipoj estis enpikitaj per mil pingloj.

Mi rampis de la ĉevalo, prenis ĝian bridilon, kaj ŝanceliĝe paŝis antaŭen. Ĝi sekvis min malrapide, malŝargite de ĝia pezo. Mark tiris sian Tony:n malantaŭ si, sed verŝajne li estis pli lacigita ol mi. Li ŝanceliĝis kaj ŝajnis fali je ĉiu paŝo. Tiel ni pene iris boneble duonan anglan mejlon plu, ĝis mi aŭdis malantaŭ mi laŭtan ĝemon. Mi reenvidis. Mia kara Mark kuŝis sur la sablo kaj malfermigis la okulojn. Mi paŝis al li kaj sidiĝis ĉe li, silente kaj senvorte, ĉar neniu interparolo povis ŝanĝi nian situacion.

Ĉu tiu nun estis la fino de mia vivo, la fino de mia migradoj? Mi volis pensi, pri la gepatroj, pri la gefratoj hejme en la fora Germanujo, volis koncentrigi miajn pensojn pro preĝo — ne eblis, ĉar mia cerbo bolis. Ni estis estiĝintaj oferoj de malfeliĉaj cirkonstancoj. Mia mustango estis faletinta antaŭ du tagoj, kaj lamis ekde tiam, tiel ke ni bezonis multe pli longan tempon pro la vojo trans la Llano ol ekspektita. Krome mi subite devis ek trovi hodiaŭ, ke la vojindikantaj palisoj deflankiĝis de la direkto. Do estis uzita tiu kruela truko, kiu antaŭ ni kostis la vivon de multaj homoj.

Malsupre de Santa Fé kaj transe de Paso del Norte ofte venas grupoj de orserĉistoj, kiuj havis feliĉon en la minoj kaj *diggin*-oj de Kalifornio, kaj nun volas iri orienten kun la rikolto de ilia laborado. Ili devas iri trans la Llano Estacado, kaj ĵus tie teruriga danĝero atendas ilin.

Homoj, kiuj ne havis tian feliĉon en la mino, kaj perdis la emon pri honesta laboro, aĉiĝintaj uloj, kiun la okzidento elkraĉas, ekzempluloj de ĉiaspeca malmoraleco, kun iĝas je la rando de la Llano Estacado pro ataki orserĉistojn. Sed ĉar tiuj serĉistoj plej ofte estas fortaj, hardiĝintaj viroj, kiuj pruvis ilian kuraĝon dum mil mizeroj kaj bataloj, ĉiukaze estas danĝera provi elrabi ilin. Tial la rabistoj, kiujn oni nomas *stakeman*-oj, do palisuloj, aŭ Llano-vulturoj ekhavis ideon, kiu ne povis esti elpensita pli kruele kaj diablece: ili forprenas la vojindikantajn palisojn, kaj enmetas ilin laŭ malĝusta direkto, tiel ke la fremdaj, senspertaj vojaĝantoj estas kondukataj en la plej egan teruron de la dezerto, kaj al la certa ekmorto per soifo. Tiel estas facile al la krimuloj transpreni la posedaĵojn de la mortuloj, kaj la ostaroj de kelkaj cent tiam paliĝas en ega solecejo en la suna brulado, dum iliaj anoj hejme vane atendas la revenon de la feliĉoserĉiston, kaj neniam aŭdos ion pri li plu dum la tutan vivo.

Ĝis nun ni estis sekvintaj la palisojn per konfido, kaj nur hodiaŭ ĉirkaŭ la tagmezo mi estis rimarkinta, ke ili misgvidis nin. Ekde kiam ni estis deflankiĝintaj de nia direkto, tion mi ne povis diri per mia elĉerpiĝo. Iri reen tial ne konsilindis, precipe ĉar nia stato ĉiam pli valorigis ĉiun minuton. Mark neeble povis iri plu, kaj ankaŭ mi certe ne estus kapablinta pasi nur unu mejlon, eĉ se mi estus peniginta mian forton ĝisekstreme. Estis tutcerte: ankoraŭ vivante ni jam troviĝas en la tombo, se ne ia feliĉa cirkonstanco ekhelpus al ni, kaj tiu devis okazi baldaŭ.

Alte super ni eksonis akra, raŭka krio. Mi vidis supren, kaj rimarkis vulturon, kiu estis leviginta nur mallonge antaŭe, kaj tutcerte en la proksimo de la tero. Li flugis cirklon super ni, kvazaŭ li supozis nin esti ĝia certa, neforprenebla akiro. Malproksime de ni troviĝu ofero de la dezerto aŭ de la *stakeman*:oj, kaj mi vidis ĉirkaŭe pro eble trovi spuron pri tio.

Kvankam la varmego de la suno kaj la febroy puŝis la sangon en la vejnojn de miaj okuloj, tiel ke ili doloris kaj preskaŭ ŝajnis ĉesi ilian taskon, mi tamen vidis en la distanco de eble mil paŝoj kelkajn punktojn, kiuj povis esti nek ŝtonoj nek teraltaĵoj. Mi prenis mian Henry-pafilon kaj peniĝis proksimiĝi.

Ankoraŭ mi ne estis pasinta la duonon de la vojo, kiam mi rimarkis tri kojotojn, kaj iom distance de ili kelkajn vulturojn. La bestoj sidis ronde ĉirkaŭ korpo, kiun mi ne povis klare vidi. Devis esti aŭ besto aŭ homo, ĉiukaze vivulo, kiu ne jam estis komplete morte, alikaze la manĝemaj kreaĵoj jam delonge estis disigintaj la kadavron. Same la ĉeesto de la kojotoj plenigis min per nuanco de espero, ĉar tiuj bestoj, kiuj ne longe povas vivi sen akvo, ne povas riski iri longadistance en la dezerton. Cetere mi devis scii, de kia speco la korpo estis, kaj mi jam levis la piedon pro iri plu, kiam mi ekhavis penson, kiu igis min alŝultrigi la pafilon.

Ni estis je la rando de soifpereo. Akvo ne tieis. Sed ĉu la sango de tiuj bestoj ne povis fari iomete da refreŝigo al ni? Mi celis, sed mia malforto kaj la febroy kaŭzis, ke la faŭko de la pafilo ŝanceliĝis plurajn centimetrojn jen kaj reen. Tial mi malleviĝis, metis la brakon sur la genuon, kaj povis nun pafi certe.

Mi lanĉis, kaj denove: — du kojotoj ruliĝis en la sablo. Tiu rigardo forgesigis min ĉiun mian malforton, kaj haste mi alkuris. La lupoy estis trafita tra la kapo, sed la alia pafo estis farita tiel mistrafe, ke mi vivtempe devus honti pri ĝi, se mia stato ne estus estinta tiel malfortigita. La kugloy disbatis la antaŭkruroy de la dua, ekkurinta besto, tiel ke ĝi ruliĝis hurlante en la sablo.

Tuj mi elzonigis la tranĉilon, malfermis la kaparterion de la unua lupo, igis la lipojn al la tranĉaĵo kaj ensuĉis la sangon per avido, kvazaŭ ĝi estus olimpa nektaro. Tiam mi prenis la ledan glason de la zono, plenigis ĝin kaj paŝis al la viroy, kiu kvazaŭmorte kuŝis en la proksimo. Estis negro, kaj apenaŭ mi estis farinta vidon al lia vizaĝo, kiu nun estis ne nigre, sed malpure malhelgrize, mi preskaŭ estus faliginta la glason per surpriziĝo.

„Ĉasar!“

La negro iomete malfermis la palpebrojn post tiu alvoko.

„Akvo!“ li ĝemis.

Mi surgenuiĝis flanke de li, levis lian suprakorpon kaj metis la glasrandon sur lian buŝon.

„Trinku!“

Li malfermis la lipojn, sed lia sekiĝinta gorgo apenaŭ povis gluti, kaj daŭris longe, ĝis mi estis enfluiginta la naŭzan fluaĵon en lin. Tiam li refalis malantaŭen.

Nun mi devis pensi pri Mark. Mi antaŭpense estis unue preninta la sangon de la mortige trafita kojoto, ĉar tiu ja koaguliĝu pli rapide ol tiu de la alia, kiu ja estis nur lezite ekstere.

Mi paŝis al la dua besto. Kvankam ĝi kolere provis mordadi, mi ekprenis ĝian nukon kaj tiris ĝin al Sans-ear. Mi premis ĝin sur la teron, tiel ke ĝi ne povis moviĝi, donis la kompatan tranĉilpuŝo al ĝi, kaj malfermis la vejnon.

„Mark, jen, trinku!“

La kunulo estis kuŝinta sur la tero en kompleta apatio; sed nun li rektiĝis.

„Ĉu trinku? Ho!“

Haste li ekprenis la glason kaj malplenigis ĝin dum unu fojo. Mi prenis ĝin el lia mano kaj replenigis ĝin. Mark fintrinkis ĝin duan fojon.

„Sango, fie —! Ha, bhĥ! — Sed tamen estas pli bone ol oni pensu!“

Mi finsuĉis la malmultajn gutojn, kiuj ankoraŭ tieis, kaj tiam salte ekstaris. La fuĝinta tria kojoto estis reveninta kaj nun komencis manĝi ĝian unue mortigitan samspeculon, malgraŭ la ĉeesto de la negro. Rapide mi relevis la pafilon, alpaŝis kaj mortpafis ĝin. Per la helpo de ĝia sango povis sukcesi, ke la negro rericevis sian konscion, kaj la kapablon regi siajn membrojn.

La vojaĝanto ofte faras renkontojn, kiuj fakte ŝajnas mirakle, kaj tia miraklo ankaŭ estas mia nuna renkonto kun la negro, kiun mi bone konis. Mi estis ĝuinta plurtagan gastamikecon en la domo de lia mastro, la juvelisto Marshal en Louisville, kaj tiam ankaŭ prenis la fidelan, ĉiam gajan nigrulon en mian koron. La du filoj de la juvelisto estis farinta kun mi ĉasan ekskurson al la Cumberland-montaro, kaj poste akompanis min al la Misisipo. Ambaŭ estis fortaj knaboj, kies ĉeesto estis plezuro al mi. Kiel nun Cäsar venis tien ĉi en la Llano Estacado:n?

„Ĉu estas nun pli bone, Cäsar?“ mi demandis lin.

„Plu bone, plu bone, ho, tre plu bone!“ Li stariĝis kaj ŝajnis rekoni min nur nun. „*Massa*, ka posiblas? *Massa* Charley, la tre multe granda ĉasisto! Ho, negro Cäsar es felica ke renkontras *massa*, proke *massa* Charley salvez *massa* Bern, kva altre esos mortinta, tre multe mortinta.“

„Ĉu Bernard? Kie li estas?“

„Ho, ube es *massa* Bern?“ Li ĉirkaŭvidis kaj montris suden. „*Massa* Bern es ibe! Ho ne, esas ibe — od ibel!“ Dum tiu li turniĝis kaj montris al sudo, okcidento, nordo kaj oriento. La bona Cäsar ne povis diri mem, kie sia juna master estis.

„Kion Bernard faras tie ĉi en la Llano Estacado?“

„Kva facas? Cäsar ne savas ico, proke Cäsar ja ne vidas *massa* Bern, ca es fore kun omni alii *massa*.“

„Kiu estas la homoj, kun kiuj li vojaĝas?“

„Homi es ĉasisto, es komercisto, es — ho, Cäsar ne savas omni!“

„Kien li volis iri?“

„A Pecos-rivero, pose a Francisco al juna *massa* Allan.“

„Do Allan estas en San Francisco, ĉu?“

„*Massa* Allan es ibe, kompras grande multe oro por *massa* Marshal. Ma *massa* Marshal ne bezonas oro, proke *massa* Marshal es morta.“

„*Mr.* Marshal ekmortis, ĉu?“ mi vokis mirigite, ĉar la juvelisto tiutempe ankoraŭ estis sufiĉe bonfarte.

„Jes, ma ne de malado, ma morte de ocido.“

„Li estis murdata, ĉu?“ mi vokis terurigite. „De kiu?“

„Ocidisto venis en nokto, pulsas kultelo en mamoo de *massa* Marshal, e kunprenis omni stoni, ĵuveli ed ori, kva apartenas a *massa* Marshal. Kva es ocidinto, e ube iris, ico ne savas *sheriff*, anke ne ĵudikisto, ico nur savas detektivo e *massa* Bern ed anke Cäsar.“

„Kiam okazis tio?“

„Co esis ante multi dii, multi semani. *Massa* Bern divenis esar multe tre povre. *Massa* Bern skribis a *massa* Allan en Kaliforn’, ma ne akviris respondo e do nun kaptas ocidisto e pose iras a Kaliforn’ por serĉar *massa* Allan.“

Tiu nun vere estis teruriga mesaĝo, kiun mi ricevis tie ĉi. Rabmurdo detruis la feliĉon de la kara familio, kostis la vivon de la patro, kaj donis egajn mankojn al liaj du filoj. Iliaj plej valoraj juveloj estis perditaj, kvankam ja certe ne ĉiuj, kaj ne la tuta oro, kiel la negro diris per pardonebla triogado. Mi devis ekpensi pri la diamantoj, kiujn mi estis depreninta de Fred Morgan, kaj kiujn mi ankoraŭ kunhavis. Sed kiu povis esti la kaŭzo, kiu irigis la kulpulon for de Louisville sur la prerion?

„Kiel vi vojaĝis?“ mi demandis plu.

„De St. Louis a Fort Scott e pose trans multi akvi e monti, *massa*. Cäsar esis veharanta, kavalkanta, iranta til en granda timiga dezerto Estacado, ube nulu trovis akvo. Lore kavali fatigiti e Cäsar; lore durstis granda kvale Mississippi kavalo e Cäsar, lore Cäsar falis de kavalo e Cäsar restis ĵakar. Nun tute granda tre mizero havis Cäsar e Cäsar mortis por dursto sempre plu, til venis *massa* Charley e donis Cäsar sango en boko. Ho, *massa* salvis *massa* Bern, e Cäsar amas *massa* Charley ca grande, kval tuta mondo en tuta tero!“

Tiu nun estis deziro, pri kies plenumo mi nun povis havi nur malmultan esperon. De kie la konfido de la negro venis, mi ne povis diri, kaj redoni ĝin mi eble povis same malmulte. Tamen mi demandis plu:

„Kiel granda estis via societo?“

„Tre granda forta, *massa*: non viri e Cäsar.“

„Kien vi volis iri unue?“

„Ica Cäsar ne savas. Cäsar sempre kavalkis dop e ne aŭdis, kva multi *massa* diris.“

„Vi havas tranĉilon kaj sabron. Ĉu vi ĉiuj havis armilojn?“

„Jes, multa pafili e kulteli e pistoli e revolvi.“

„Kiu estis via gvido?“

„Viro, noma Williams.“

„Provu refoje memori pli detale, kien ili rajdis, kiam vi falis de la ĉevalo!“

„Ne savas plu. Ibe, hike, irgaloke.“

„Kiam tio estis? Je kiu tagparto?“

„Esis vespero balde ed — ha, ho, nun savas Cäsar: *massa* Bern kavalkis direte en suno, kande Cäsar falis de kavalo.“

„Bone! Ĉu vi repovas iri?“

„Cäsar nun itere kuras kvale cervo. Sango es bona medikamento por dursta.“

Fakte la stranga trinkaĵo refreŝigis ankaŭ min tiel, ke ĉiu febro estis malaperinta el

miaj membroj, kaj flanke de mi nun staris la malgranda Mark, kiu sentis la saman feliĉan ŝanĝon. Li estis alveninta pro aŭskulti nin, kaj aspektis multe pli bone ol nur kvin minutojn antaŭe.

La societo, en kiu Bernard Marshal troviĝis, certe estis same elĉerpita kiel ni, alikaze la brava juna viro certe ne estis simple forlasinta sian fidelan serviston. Eble soifado kaj malsatado regis lian internon tiamaniere, ke li tute ne plu estis la mastro de siaj pensoj kaj pensoj. La lasta informo de Cäsar lasis min supozi, ke la direkto de Bernard Marshal estis same kiel nia, okzidenten. Sed, kiel atingi lin, kiel doni helpon al ni, dum ni mem bezonis tiun helpon tiel ege, kaj ne povis uzi niajn ĉevalojn.

Mi pripensis kaj pripensis, sed ne povis trovi savigantan solvon. La societo ne povis foresti longan distancon, kvankam ĉie ĉirkaŭe neniu spuro de ĝi videblis.

Mi turniĝis al Mark.

„Restu tie ĉi ĉe la ĉevaloj! Eble ili refreŝiĝas tiel, ke ili poste povos iri mejlon plu. Se mi ne reestos tie ĉi post du horoj, sekvu mian spuron.“

„*Well*, Charley, vi ja ne povos iri longan distancon, ĉar tiu malgranda gluto da kojota suko ekzemple proviziĝos neeble longe.“

Kiam mi tie ĉi uzas en la skribigo de nia interparolo ‚vi‘:n anstataŭ ‚Vi‘, mi volas indiki, ke ni nun interkomunikis kiel delongaj kamaradoj. Verece ni diris antaŭe kiel poste ‚you‘, ĉar ni uzis la anglan lingvon.

Mi esploris la teron kaj trovis, ke la spuro de Cäsar, de la loko, kie li estis kuŝinta, iris norden. Sekvante ilin post ĉirkaŭ dek minutoj mi atingis lokon, kie la spuro de dek ĉevaloj iris de oriento okzidenten. Ĉi tie la elĉerpiĝo ĵetis la negron de sia ĉevalo, ŝajne sen ke iu rimarkis ĝin. Eble li estis estinta pli longan distancon malantaŭ lia societo. Mi plusekvis la spurojn kaj vidis, ke lia ĉevalo estis trotinta malantaŭ la aliaj, sed ĉiuj ĉevaloj ŝajne estis terurige lacigitaj, ĉar ĉiuj estis faletintaj de tempo al tempo, kaj iliaj paŝoj estis tiel malfacilaj, ke ili softe estis frotintaj la sablon per la hufpintoj.

Tio bone videbligis la spuron, tiel ke mi povis rapide kuri laŭ ilin tute senpene. Mi diris ‚rapide‘, kaj fakte okaziĝis rapide, kvankam mi ankoraŭ hodiaŭ ne povas decidi, ĉu la terura trinkaĵo aŭ la aflikto pri Bernard Marshal donis al mi tiajn neekspektitajn fortojn.

Tiel mi estis pasinta certe mejlon, kiam mi rimarkis kelkajn unuope starantajn kaktarojn, kiuj estis tiel tute sekiĝintaj, ke ili haviĝis preskaŭ flavan koloron. Pli fore ili staris en unuopaj grupoj, kiuj iom post iom ĉiam pli oftigiĝis, ĝis ili fine formigis klare videblan kaj densan lineon, kiu transiris ĝis for trans la rando de la horizonto.

La menciita spuro iris preter la danĝeraj kreskaĵoj. Mi rigardis ĝin, kaj mi subite havis penson, kiu plenigis min subite per novaj fortoj.

Kiam, en la ardvarmegaj ebenaĵoj de la duoninsulo Florida, la varmego iĝas tiel alte, ke homo kaj besto devas pereji per soifo, kaj kvankam la tero restas kiel ‚fluaĵa plumbo, kaj la ĉielo kiel arda erco‘, sen videbligi eĉ ne plej malgrandan nubon, tiam la homoj tie bruligas la kanon kaj ĉiun malsekajn arbedaĵojn, kaj vidu jen: venas pluvo. Ajn kiu estas pli malpli konata al la leĝoj, fortoj kaj aperaĵoj de la naturo, certe povas klarigi tiun fenomenon, sen devi kredi al miraklo kaj sorĉado.

Pri tio mi pensis tiun momenton, ja ankaŭ ĉar mi mem jam estis uzinta tiun fakton, kaj ĝi apenaŭ estis pensita, kiam mi jam genuiĝis ĉe la plantoj pro detranĉi la necesajn brulfibrojn per la tranĉilo. Kelkajn minutojn poste ekflamis deca fajro, kiu komence malrapide, sed tiam ĉiam pli rapide vastiĝis, ĝis mi fine staris antaŭ flammaro, kies limoj ne estis videblaj.

Mi jam estis spertinta plurajn prerifajrojn, sed neniu el ili estis okaziĝinta per tia tondra bruego super la tero kiel tiu kaktofajro. La unuopaj plantoj krevis kun pafileca krako, tiel ke sonis, kvazaŭ tuta armeo estis disiĝinta pro interbatalo de viro kontraŭ viro. La flamoj altiĝis ĝis la ĉielo, kaj super ĝi ŝvebis kaj tremis maro de ardaĵaj vaporoj, trapafataj kaj traflugataj de la kakteroj, kiuj estis suprenigitaj de la varmego kiel sagojn. La tremo rimarkeble vibris sub miaj piedoj, kaj en la aero eĥis obtuze, kiel la muĝo de batalado.

Tiu estis la plej bona helpo, kiun mi — almenaŭ nun — povis doni al Bernard Marshal kaj liaj kunuloj. Mi reeniris, senzorge, ĉu mi povos trovi iliajn spurojn poste aŭ ne. La espero fortigis min tiel, ke mi estus farinta la vojon reen post ĉirkaŭ nur kvarona horo. Sed ne necesis iri ĝin tute, ĉar jam duondistance Mark kun Cäsar kaj la du ĉevaloj, kiuj denove povis iri pli malpli almenaŭ malfacile, renkonte venis al mi.

„Zounds, Charley, kio nu estas okazanta tie antaŭe?“ Sans-ear demandis. „Unue mi pensis, ke estus tertremo. Sed nun mi ekzemple kredas, ke tiu infera sablo eĉ bruliĝis.“

„Ne la sablo, Mark, sed la kakttoj, kiuj staras tie amase.“

„Kiel ili bruliĝis? Mi ja ne kredas, ke vi bruligis ilin.“

„Kial ne?“

„Nu verece, li faris tion! Sed diru, Charley, pro kio?“

„Pro krei pluvon.“

„Ĉu pluvon? Ne pensu malbone pri mi, Charley, sed mi ekzemple kredas, ke vi iomete freneziĝis!“

„Ĉu vi ne scias, ke en kelkaj popoloj la freneziĝintoj valoras kiel ruzaj homoj?“

„Mi ne esperas, ke vi volas aserti, ke vi faris ion tre ruzan! La varmego ja estas duoble pli alte ol antaŭe.“

„La varmego altiĝis, kaj tiel evoluigis elektreco.“

„Ekzemple fortenu vin kun via elektreco! Mi ne povas manĝi ĝin, mi ne povas trinki ĝin, mi entute ne scias, kiun fremdan kreaĵon mi devas imagi per ĝi.“

„Vi baldaŭ aŭdos ĝin, ĉar post la plej mallonga tempo ni havos la plej belan fulmadon, kaj eble ankaŭ kelkajn tondrojn kun tio.“

„Ĉesu nun! Bedaŭrinda Charley, vi fakte komplete freneziĝis!“

Li vidis al mi tiel prizorge, ke mi devis rimarki, ke li ne ŝercis. Mi montris supren.

„Ĉu vi vidas la vaporojn kiuj tie jam amasiĝas?“

„Fulmotondro, Charley, tio veras! Finfine ja ŝajnas, ke vi fakte ne estas tiel freneze, kiel mi pensis!“

„Ili formigos nubon, kiu devas senŝarĝiĝi per fortego“, mi pluis.

„Charley!“ li vokis, „se vere estas tiel, tiukaze mi estas stultulo, kaj vi estas la plej ruza ulo en la Unuiĝintaj Ŝtatoj, kaj ankaŭ iomete ekster ili.“

„Ne estas tia grava afero, Mark. Mi estis uzinta tiun aĵon jam foje en la Llano, kaj ripetis ĝin hodiaŭ, ĉar mi pensis, ke iom da pluvo ne povus damaĝi al ni. Vidu, jen vi jam havas la nubon! Ĵus kiam la kaktaj finbruliĝos, ĝi ekos. Kaj se vi ne volas kredi ĝin, nur vidu al via Tony, kiel ĝi ŝvingas sian vosteton kaj vastigas la nazon! Ankaŭ mia mustango jam flaras la pluvon, kiu sed ne pli vastiĝos ol la fajrolineo. Venu antaŭen, proke ĝi ankaŭ povos trafi nin ĝuste!“

Ni paŝis antaŭen, sed sambone ni ankaŭ estus povintaj surĉevaliĝintaj, ĉar niaj bestoj estis tiel viglaj, ajn kiel iliaj fortoj permesis tion al ili, kaj vere urĝis antaŭen. Ilia natura emo igis ilin flari la deziregitan freŝigon.

Mia antaŭdiro plenumiĝis. Duonan horon poste la malgranda nubo tiel vastiĝis, ke la tuta ĉielo super ni, ĉirkaŭe ĝis la horizonto estis malhele nigre. Tiam ĝi ekkomencis, ne iom post iom kiel en la mezvarmaj zonoj, sed subite, kvazaŭ la nuboj konsistis el firmaj ujejoj, kiuj estis renversataj. Estis, kvazaŭ krudaj pugnoj batis sur niajn ŝultrojn, kaj post la tempo de unu minuto ni estis malsekigitaj tiel komplete, kvazaŭ ni estis naĝintaj tra rivero kun la vestaĵoj. La du ĉevaloj unue nur staris trankvile, kaj lasis la falanta fluon esti verŝata sur ilin kun ĝoja spirego. Sed tiam la Tony kaj eĉ mia lamanta mustango komencis fari kelkajn saltojn, kaj baldaŭ ni povis rimarki, ke iliaj fortoj estis plene revenintaj. Ni mem sentis eksternorman bonfarton, eltenis niajn kovrotukojn pro kolekti la valoran akvon, kaj fluigis, kion ni ne trinkis, en niajn tubojn.

Plej ĝoje kondukis Cäsar, la negro. Li faris saltradojn kaj transkapiĝojn, kaj faris nepriskribablajn grimacojn.

„*Massa, massa*, ho, ho, akvo, bela akvo, bona akvo, multa akvo! Cäsar es sana, Cäsar es forta. Cäsar itere kuras, vehas e kavalkas til Kaliforn! Ka *massa* Ben anke havas akvo?“

„Verŝajne, ĉar mi ne kredas, ke li fore distanciĝis de la kakta lineo. Sed nu trinku, la pluvo baldaŭ ĉesos!“

Cäsar levis sian vastrandan ĉapelon, kiu estis falinta de li, de la tero, eltenis la suban flankon, disŝiris la ŝvelecajn lipojn, tiel ke estiĝis faŭko, kiu vastiĝis de orelo al orelo, igis la kapon malantaŭen, kaj ŝutis la refreŝigan trinkaĵon inter la disigitajn dentojn.

„Ho, ha, bone, *massa*! Cäsar ankore drinkos grande multe plu!“ Li denove etendis la ĉapelon, sed estis elrevigata. „Ha, pluvo es fina; nula akvo plu venas!“

Verece la pluvo ĉesiĝis post tondromuĝo same subite, kiel ĝi estis komencinta, sed ni ja ne plu bezonis ĝin, ĉar nia soifo estis kontentigita, kaj krome ni povis pleniĝi niajn tubojn ĝis la rando.

„Nun ni manĝu iometon“, mi admonis, „kaj poste rapide antaŭen, proke ni atingos Marshal:on.“

La manĝado estis finigita post malmultaj minutoj. Estis nur peco de sekigita bubalaĵo. Tiam ni surĉevaliĝis kaj trotis antaŭen, dum kio Cäsar pruviĝis esti bona piediranto, ke li ĉiam povis facile same antaŭeniĝi kiel ni. Mia besto mirigite resaniĝis, ankaŭ la lamado ŝajnis esti rebonigita, kaj ĝi ĉiam samrapidis kiel la Tony, pri kio mi aparte ĝojigis.

Sed la spuroj de Marshal kaj liaj kunuloj estis tute forviŝitaj de la pluvo, sed mi ja konis ilian direkton, kaj ankaŭ ne daŭris longe, ĝis mi rimarkis senkernigitan kalbason,

kiu kuŝis sur la tero, kaj verŝajne estis forĵetita de unu el la homoj.

La kaktolineo ŝajne iris fore de oriente okcidente, ĉar la nigra finbruliĝejo ŝajne ne havis finon. Tio estis kare al mi, ĉar mi povis konkludi per tio, ke la serĉitoj ankaŭ estis kontraŭfitaĵ de la pluvo. Sed tamen la eksa brulejo finiĝis, kaj tuj post tio mi ekvidis en la foreco malhelan grupon, kiu konsistu el homoj kaj bestoj. Mi enmanigis la teleskopon kaj nombris naŭ homojn kaj dek ĉevalojn. Ok el la figuroj kaŭris sur la tero, sed la naŭa estis sur la ĉevalo, kaj ĵus disiĝis de la grupo pro galope rajdi en nian direkton. Sed tiam la rajdanto ŝajne ekvidis nin, kaj malrapidigis sian ĉevalon. Mi direktigis mian okulon pli detale al li, kaj mi rekonis Bernard Marshal:on.

Nun mi ekrimarkis la interrilaton de la faktoj. Marshal estis troviĝinta en tiu stato de disiĝo kaj egalanimeco, ke li same kiel siaj kunuloj ne atentigis pri la malapero de sia servisto. Per la refreŝiga, reviviga pluvo li estis rricevinta sian sensajn kapablojn kaj ekkonis sian unuan devon serĉi Cäsar:on kaj reenigi lin en la societeton. Pri tio indikis ankaŭ la dua ĉevalo, kiun li kuntiris per la kondukiloj. Ke neniu el la aliaj ekkunvenis, estis facile kompreneble, kaj mi estus vetinta, ke ili ĉiuj estis *yankee*:oj, al kiuj la vivo de *nigger*^s, kiu eĉ ne estis ilia propra servisto, valoris tiom kiel malplena nukso.

Marshal rigardis nian malgrandan societeton, vokis kelkajn vortojn reen, kaj subite ĉiuj el ili sidigis sur iliaj ĉevalojn, kun la armiloj en la manoj.

„Antaŭen, Cäsar, anoncu nin!“ mi ordonis al la negro.

Cäsar trotiĝis, kaj ni sekvis lin paŝe. Kiam Marshal rekonis sian serviston, ĉiu pridubado estis malaperinta. La societo redeĉevaliĝis kaj atendis nin en trankviligita teniĝo. Ni estis lasinta nur mallongan antaŭecon, kaj tial aŭdis la anoncon, kiun li vokis al la juvelisto.

„Ne pafez, *massa*, ne pikez! Tre bona bela viri venas, es *massa* Charley, kva mortbatas nur *indsman* e fripono, ma lasas vivar *gentleman* e negro!“

„Charley, ĉu tio eblas!“ lia majstro vokis surprizite, kaj momente rigardis min pli akre.

En lia hejmejo mi estis aperiĝinta iom pli urbanece, ol estis eble sur la savano. Vizaĝon, kun nur eta barbo, oni ne tuj rekonas post monatoj, kiam ĝi estas kovrita de plenbarbo. Kaj ĉar Marshal neniam estis vidinta min en mia ĉitempaj vestaĵoj, mi nun ne pensis malbone pri li, ke li ne rekonis min jam de longa distanco. Nun mi estis proksimiĝinta al li je dek ĉevallongoj, kaj nun li ekrimarkis, ke Cäsar estis raportinta ĝuste al li. Subite li estis ĉe mi, kaj ofertis sian manon al mi de la ĉevalo.

„Charley, ĉu vere estas Vi? Mi pensis, ke Vi volis iri al Fort Benton, kaj al la neĝ-montaro, ĉu? Kiel Vi venis en la sudon?“

„Mi ankaŭ estis tie supre, Bernard. Sed ŝajnis esti al mi tro malvarme tie, kaj mi iomete recedis malsupren. Cetere koran saluton tie ĉi en la Estacado! Ĉu Vi volas konigi min al Viaj kunuloj?“

„Ŝate! Charley, mi diras al Vi, mil dolaroj ne estas tiel valoraj al mi kiel Via ĉeesto. Deĉevaliĝu kaj alpaŝu!“

Bernard Marshal prezentis min per mia civitana nomo, kaj iliajn al mi, kaj tiam ŝtormis min per sennombraj demandoj, al kiuj mi respondis al li laŭeble bone. La aliaj

estis ĉiuj *yankee*-oj, kvin aĉetistoj de la *Mountain*:a Peltkomercista Societo kun bonega ekipaĵo kaj kun tri personoj, kiuj kunhavis tiom da armiloj, ke ili ne povis esti okcidentuloj. Tutcerte estis la komercistoj, pri kiuj Ĉasar estis parolinta. Mi plie supozis ilin esti aventuruloj, kiuj venis en la okcidenton pro serĉi ilian feliĉon per ajn ia honesta aŭ malhonesto maniero. La plej maljuna de la aĉetistoj, kiu estis prezentita al mi kiel Williams, estis la estro de la grupo, kaj komence ŝajnis al mi esti olda „lavorso“, kiel oni kutime esprimiĝas en la okcidento. Li turniĝis al mi, kiam la unuaj demandoj de Bernard estis responditaj. La malgranda Mark tute ne faris apartan impreson al li.

„Ni nun scias iel ĉirkaŭe, kiu Vi estas, kaj de kie Vi venas. Nun lasu nin ankaŭ scii, kien Vi volas iri!“

„Eble al la Paso del Norte, ankaŭ eble aliloken, *Sir*, ajn kien, kie ni trovos okupon.“
Mi ne supozis, ke estis necese diri al li pli, ol li bezonis scii intertempe.

„Kaj kiu estas Via okipiĝo?“

„Iomete ĉirkaŭrigardi en la mondo.“

„*Lack-a-day*, tio estas laboro, dum kiu oni ne sentas enuon, kvankam oni ne bezonas peni! Do Vi certe estas sufiĉhava, se ne eĉ riĉa viro. Oni povas rimarki tion per Viaj brilpuraj armiloj!“

Per tiu supozo li ja fakte estis sur erariga vojo, ĉar mi posedis ĵus nur tiujn armilojn. Cetere mi ne ŝatis la demandon, kaj eĉ malpli la vidon, kiu akompanis ĝin, kaj la duone moke, duone provoka sono, en kiu ĝi estis farita. Tiu viro estis tre malgardiĝe, kaj kaŭzis al mi, malgraŭ sia bonkreita ekstero, neniun konfidon en mi. Mi decidis poste rigardi lin pli akre, kaj tial respondis nek jese nek nee.

„Ĉu riĉa, ĉu sufiĉhava, tio estas sufiĉe negrava en la Estacado, mi supozas.“

Per tio Vi pravas, *Sir*. Nur unu duonan horon poste ni estis pereonta per soifo, kaj kapablis aĉeti neniun gluton da akvo per ĉiom da oro en la mondo. Nur pura miraklo savigis nin, miraklo, kia neniam antaŭe estis okaziginta en la Llano Estacado.“

„Al kio Vi aludas per tio?“

„Al la pluvo, memkompreneble. Aŭ ĉu Vi eble venis el direkto, kie ĝi ne povis trafi Vin?“

„Ĝi trafis nin, ĉar ĵus ni ja kreis ĝin.“

„Ĉu krejs? Kion Vi volas diri per tio, *Sir*?“

„Ke ni, same kiel Vi, estus pereintaj per soifo, kaj rimarkis, ke ni povis trovi nur savigon, per ke ni alŝorĉu nubojn, fulmon kaj tondron.“

„Aŭskultu, *master* lozbuŝulo! Mi ja ne volas ekspekti, ke Vi supozas nin esti homoj, al kiuj Vi povas aĉetaĉi felon de urso kiel tiu de *whippoorwill*, alikaze Via propra felo estos malbone traktata post malmultaj momentoj! Vi certe iam estis en Utah ĉe la granda sallako, kaj apartenas al la „Sanktuloj de la Lastaj Tagoj“, kiuj ankaŭ faras similajn miraklojn kiel Vi.“

„Fakte mi estis unu fojon tie transe, sed nur per tio delonge ne estas mormono. Cetere Vi pravas, per kion Vi diris krome. — Kaj nun al la afero! Ĉu Vi permesos al ni du aliĝi al Vi?“

„Kial ne? Aparte, ĉar Vi ja estas konata al *Mr. Marshal*. Kio do okazis, ke Vi riskis iri en la Llano Estacado:n duope?“

Mi agis laŭ mia malkonfido, perke mi ŝajniĝis senpripense kaj sensperte.

„Kion oni riskas per tio?“ mi demandis. „La vojo estas indikata per la palisoj. Oni do eniras, kaj reeliras feliĉe.“

„*Good luck*, kiel rapide Vi finpensas! Ĉu Vi do neniam aŭdis pri la *stakeman*:oj?“

„Kiaj homoj estas tiuj?“

„Jen la afero! Mi ne volas paroli pri ili, ĉar kiam oni desegnas la diablon sur la muron, li aperos. Sed mi diras tiom al Vi: Aĵn kiu riskas iri duope en la Estacado:n, estu ulo kiel Old Firehand, Old Shatterhand aŭ Sans-ear, la maljuna indianmortigisto. Certe Vi ankaŭ ne aŭdis ion pri tiuj homoj, ĉu?“

„Ho jes, sed mi kredas, ke tiuj estas nur ankaŭ aliaj bravaj viroj pli. Kiel longe ni ankoraŭ rajdos, ĝis ni venos el la Estacado?“

„Du tagojn.“

„Ni ja estas sur la ĝusta vojo, ĉu?“

„Kial ni ne estu?“

„Ĉar ŝajnis al mi, kvazaŭ la palisoj subite kondukis sudorienten, anstataŭ sud-okzidenten.“

„Tio povas ŝajni al Vi, sed ne al olda, sperta vojaĝanto, kiel estas mi. Mi konas la Estacado:n kiel mian kuglosakon.“

Mia suspekto grandiĝis. Se Williams vere estis sperta, li certe devis scii, ke li deflankiĝis. Mi decidis ekzameni lin iomete plu.

„Kio okazis, ke la *Mountain*:a Peltkomercista Societo sendis Vin tiel fore suden? Ŝajnas al mi, ke estas multe pli da peltaĵoj en la nordo.“

„Kiel saĝe kaj ruze Vi estas! Pelto estas pelto kaj felo estas felo. Dekalkulite, ke ankaŭ tie ĉi estas grizaj kaj nigraj ursoj, *racoon*:oj, didelfoj kaj aliaj peltbestoj amase, ni iras suden pro haviĝi kelkajn mil felojn de la aŭtuna migrado de la bubaloj.“

„Ha, tiel! Mi kredis, ke Vi povas kapti ilin pli facile supre en la parkoj, kaj ĉirkaŭ ili. Cetere Vi, kiel peltaĉetistoj, estas en bona situacio, ĉar Vi ne devas timi ion de la *indsman*:oj. Oni rakontis al mi, ke la *Mountain*:a Peltkomercista Societo uzas siajn aĉetistojn ankaŭ kiel mesaĝistoj kaj leterportistoj, kaj tia letero estu la plej bona talismano kontraŭ la malamikecoj de la indianoj. Ĉu tio veras?“

„Jes. Anstataŭ ni devas ĉiam timi la malamikaĵojn de la ruĝuloj, ni ĉiam povas konfidi pri ilia helpo.“

„Do eble ankaŭ Vi estas ekipita per tiaj leteroj?“

„Certe. Mi nur devas montri la sigelon, kaj ĉiu indiano garantios savon al mi.“

„Vi scivoligas min, *Sir*. Lasu min foje vidi tian sigelon!“

Mi rimarkis, ke Williams enembarasiĝis, kion li sed volis kaŝi per ĉagrenita mieno.

„Ĉu Vi jam aŭdis ion pri letera sekreteco, *mann*?“ li ekkoleris. „Mi havas permeson montri la sigelon nur al *indsman*:oj.“

„Mi ne postulis legi la enhavon de la letero“, mi respondis. „Cetere mi ne komprenas Vian rifuzon. Ŝajne Vi neniam iĝis en la situacion legitimumi ankaŭ al blankulo!“

„En tiu kazo sufiĉas mia pafilo. Memortenu tion!“

Mi ekmienis, kvazaŭ mi estis timigita, kaj silentis en plej bone ludata embaraso. La malgranda Mark sciante ridetis, ne al mi, — ĉar tio estus evidentiĝinta lin — sed al sia Tony. Sed mi turniĝis al Marshal.

„Ĉasar diris al mi kien Vi volas iri, Bernard, kaj pro kio kaŭzo Vi faras la vojaĝon. Vi rakontu al mi pli detale pri tio pli poste! Nun unue nur mallonga demando: Ĉu Vi pluiros hodiaŭ, aŭ ĉu Vi tranoktos tie ĉi?“

„Estis decidita, ke ni restos.“

„Tiukaze mi prenos la selon de mia ĉevalo.“

Post tio mi leviĝis, prenis la selon kaj jungilaron de mia mustango, kaj donis kelkajn manplenojn da maizeroj al ĝi pro manĝi. Mark faris la samon al sia ĉevalino. Dum tio ni evitis interparoli. Tio ankaŭ ne necesis, ĉar ni tamen interkompreniĝis bone. Kiam du ĉasistoj estis kunestinta kelkan tempon, ili legas la pensojn en la okuloj de la alia. Ankaŭ kun Marshal mi ne parolis kaŝan aŭ mallaŭtan vorton. Tiel la resto de la tago pasiĝis kun plej ofte negravaj interparoloj, kaj vesperiĝis. „Surpostenigu gardistojn, *Sir!*“ mi postulis al Williams. „Ni lacas, kaj volas dormi.“

Li faris tion, kaj mi rimarkis, ke intence neniam duoblan postenon estis kunmetinta el unu el liaj anoj kaj niaj. Tio pensigas min.

„Dormu meze inter ili, pro ke ili ne povas kaŝe interparoli!“ mi mallaŭte diris al Marshal, kiu mire vidis al mi dum tiu postulo, sed tamen agis laŭ ĝi.

La ĉevaloj estis kuŝiĝintaj, ĉar estis neniu manĝaĵo por ili. Dum la aliaj formis cirklon, mi kuŝiĝis ĉe mia mustango, kies korpon mi uzis kiel kapkuseno, al la aliaj tiu estis la seloj. Mi havis mian kaŭzon pro tiu apartiĝo. Mark ne bezonis signon de mi. Li komprenis min kaj elektis sian lokon tiel inter la fremduloj, ke ili povis kaŝe interparoli nur dum la gardado.

La steloj komencis lumi, sed ŝvebis — eble per la pluvo — stranga nebulaĵo inter ili kaj la tero, tielke ilia brileto ne povis malsupreniĝi tiel hele al ni kiel dum la aliaj vesperoj. Du el la komercistoj havis la unuan gardadon. Ĝi okaziĝis sen ia eminentaĵo. Williams estis elektinta la duan gardadon por si kaj la plej maljuna de iliaj anoj, kiu estis nomita Mercroft dum la konatigo. Kiam estis ilia vico, ili ankoraŭ ne estis dormiĝintaj. Ili leviĝis, kaj ĉiu paŝis laŭ sia duoncirklo. Mi memortenis detale la du punktojn, kie ili regule renkontis. Unu el la punktoj estis en la proksimo de la ĉevalo, kiu apartenis al la negro, kaj tio ŝajnis al mi bona cirkonstanco, ĉar ne estis ekspektinda, ke oni estis doninta bonan preriĉevalon, antaŭ kies flarado oni devis gardiĝi.

Mi ne povis vidi, ĉu la du viroj interparolis kiam ili renkontis. Sed ŝajnis al mi, kvazaŭ la sono de iliaj paŝoj rimarkigis min, ke ili ĉiam hezitis iom da tempo, antaŭ ili turniĝis reen. La restado sur la savano estis akriĝinta mian aŭdokapablon, kaj se mi ne eraris, mi havis du firuzajn virojn antaŭ mi.

Laŭ arko mi kaŝrampis al la ĉevalo de Ĉasar. Ŝajnis esti pacienca kaj konfidema ĉevalaĉo, ĉar ĝi malkaŝis mian proksimiĝon nek per spirego nek per plej eta moviĝo, kaj mi povis premeti min tiel dense al ĝia korpo, ke mi ne devis timi malkaŝigon.

Ĵus tiam Williams venis de unu flanko, kaj Mercroft de la alia. Antaŭ ambaŭ reeniris, mi klare aŭdis la vortojn:

„Mi lin, kaj vi la negron!“

Williams estis dirinta tiujn vortojn. Kiam ili revenis, mi aŭdis:

„Sed ankaŭ ilin.“

Verŝajne Merckroft estis farinta demandon transe je la alia renkontopunkto rilate al Mark kaj mi.

Kiam ili reproksimiĝis, sonis:

„*Pshaw!* Unu estas malgranda, kaj la alia — ja okazos dumdorme!“

Per la ‚malgranda‘ li certe parolis pri Mark, kaj per la ‚alia‘ li celis al mi. Estis klare, ni estu murdigotaj. Kial, tion mi ne povis klarigi al mi. Denove ili proksimiĝis kaj mi klare aŭdis la respondon:

„Ĉiujn tri!“

Eble transe estis eldirita la demando, ĉu la tri komercistoj devis havi la saman sorton kiel ni. Tiuj kvin peltaĉestistoj do volis fiataki nin, kvin kontraŭ sep. La fino estis facile elpensebla: ili estus neigonta nin sen ke ricevi nur grataĵon en la manon, se mi ne estus havinta la ideon kaŝe aŭskulti ilin. Nun la du perfiduloj denove renkontiĝis.

„Ne unu minuton pli frue — kaj nun finon!“ Williams diris.

La bela interparolo do estis finigita, kaj mi povis facile elpensi, ke la lastaj vortoj rilatis al la tempopunkto, je kiu la fiago devis komenci. Dumdorme — tion mi aŭskultis. Sed kiam tio estis? Ĉu hodiaŭ aŭ morgaŭ? Mi ĉiukaze agis pli certe, kiam mi enkalkulis hodiaŭo ol eble morgaŭo; kaj ĉar la du fibuboj devis promenadi nur kvaronon horon plu, estis urĝa tempo ekagi antaŭ ili.

Mi saltpretiĝis. Ili ree renkontiĝis, sen paroli unu vorton. Ambaŭ turniĝis je la sama tempo, kaj apenaŭ, ke Williams estis preterpasinta, mi rapide leviĝis malantaŭ li, metis la maldekstran manon ĉirkaŭ lian kolon, tiel ke li ne povis elpuŝi sonon, kaj trafis lin per la pugnita dekstra mano tiel sur la tempion, ke li mallaŭte falis sur la teron.

Nun mi anstataŭ li daŭrigis la iradon, kaj renkonte iris al Merckroft. Li antaŭsciis nenion kaj kredis, ke mi estus Williams. Mi ekprenis lin ĵus de antaŭe je la kolo kaj batis lin teren. Almenaŭ dek minutojn la du kuŝis senkonscie; tion mi sciis. Tial mi nun rapide paŝis al la grupo de la dormantoj. Nur du el ili ne dormis. Mark memkompreneble, kaj Bernard, kiu per mia flustrita ordono estis igita en tian maltrankvilecon, ke li ne povis ekdormi.

Mi igis la lazon de la zono — Mark tuj faris la samon.

„Nur la tri aĉetistojn“ mi flustris, kaj tiam mi vokis laŭte: „*Halloo*, ek, Vi viroj!“

Subite ĉiuj ekrektiĝis, eĉ Cäsar, la negro, sed same rapide la maŝoj de niaj lazoj ĉirkaŭis la brakojn kaj suprokorpon de du peltokomercistoj — dua eko, kaj la rimenoj tiel forte kuniĝis, ke ili ne povis lozigataj de la kaptitoj. Bernard Marshal, pli antaŭente ol komprene, estis atakinta la trian kaj fikstennis lin, ĝis mi estis kateninta lin per sia propra lazo. Kaj tio estis okazinta tiel rapide, ke ni jam estis finigintaj, kiam unu el la tri komercistoj kuraĝiĝis kaj ekprenis sian pafilon.

„Perfido! Al la armiloj!“

Mark ekridis laŭte.

„Lasu vian fajroŝprucigilon trankvile, mia knabo! Ja mankos la meĉo al vi, kaj al la aliaj, hihihih!“

La gardiĝa malgrandulo dum mia kaŝaŭskultado estis forpreninta la meĉaĵojn de la pafiloj, pruvo, kiel ekzakte li komprenis min, senke ni estis interŝanĝintaj unu vorton.

„Estu senzorge, Vi homoj, tute nenio okazos al Vi!“ mi trankviligis ilin. „Tiuĵ ĉi viroj volis murdi nin kaj Vin; tial ni sendanĝerigis ilin intertempe.“

Malgraŭ la malheleco rimarkeblis la ektimiĝo, kiun miaj vortoj kreis en ili; kaj ankaŭ Cäsar haste alpaŝis.

„*Massa*, ka ili anke volas ocidar Cäsar?“

„Ankaŭ vin!“

„Tale ili mortez. Cäsar akroĉas ili en Estacado, multe alta a fosto!“

La kaptitojn ne aŭdebligis unu sonon; eble ili esperis pri la helpo de la gardistoj.

„Cäsar, tie transe kuŝas Williams, kaj tie la alia. Alportu ilin!“ mi ordonis al la negro.

„Ja ili mortas?“ li demandis min.

„Ne, ili nur senkonsciencas.“

„Bone, m’aportos ili.“

La grandega nigrulo portegis unu post la alian sur siaj vastaj ŝultroj, kaj ĵetis ilin sur la teron. Ili tuj estis katenataj. Nun ni finfine povis paroli, kaj mi klarigis al la komercistoj tion, kion ni estis aŭskultintaj kaj farintaj. Ili ekiĝis en koleregon, kaj tuj postulis la mortigon de la kaptitoj. Mi devis kontraŭi al ili.

„Ankaŭ la savano havas rajton kaj leĝojn“, mi deklaris. „Se ili starus antaŭ ni kun la armiloj en la manoj, tiel ke nia vivo estus en danĝero, ni povus pafi ilin teren. Sed kiel la aĵoj nun estas, ni ne murdu, sed formu juĝistaron.“

„Ho, ho, jes, ĵurio“, la negro diris, ĝojigante pri tia aventuro, „E pose Cäsar akroĉas omni tute kin!“

„Ne nun! Estas nokto; ni ne havas fajron kaj devas atendi, ĝis tagiĝos. Ni estas sep viroj. Do kvin povas trankvile dormi, dum ĉiam du gardas. Tiel ni certas pri la kaptitoj, ĝis la suno revenos.“

Estis klopodo efikigi mian opinion, sed fine tamen tiel realiĝis, ke kvin rekuŝiĝis pro dormi, dum mi ekgardadis kun unu el la komercistoj. Horon poste ni estis anstataŭigataj. Mark transprenis la lastan gardadon sole, ĉar je tiu tempo de la tago jam krepuskis, kaj sufiĉis du okuloj pro certigi la necesan sekurecon.